


# PONTO ☆

*Jaro 3 N-ro 6 (21) Organo de Sunda Esperanto Agado dec. 2004*

## Jubilea kongreso en 2006

Kiel vi certe legis pli frue en Ponto ni planas 100-jarajn jubileojn por la Malmöa klubo kaj SEF en la Ĉieleniraj festotagoj de 2006. Ni ĝojas ke ankaŭ DEA akceptis nian inviton okazigi sian generalkunvenon en Malmö kun ni.
La kongresa komitato vizitis en novembro la lernejon de Kvarnby Popolaltlernejo ĉe Industrigatan 4. Tiu strato estas ne tro for de la centro de Malmö.
Ĉiuj ricevis pozitivan impreson pri la ejo kaj estis decidite lui la tutan 3-an etaĝon, kiu krom kunvenejo (kafejo) por ĉirkaŭ 100 personoj enhavas 4 klasĉambrojn, bibliotekon, komputilan ĉambron kaj eblecon malmultekoste tranokti por gejunuloj.
Ni antauvidas sufiĉe grandan laboron kaj sekve la komitato jam komencis prepari la kongreson.

Sten Svenonius
prezidanto de KEM

.

## Eldonplano por PONTO 2005

| | Materialo | Eldono |
|---|---|---|
| **N-ro 1** | **12/2** | **26/2** |
| **N-ro 2** | **9/4** | **22/4** |
| **N-ro 3** | **6/8** | **19/8** |
| **N-ro 4** | **1/10** | **14/10** |
| **N-ro 5** | **3/12** | **16/12** |

## La 90-a UEA-kongreso

okazos en Vilnius, Litovio, 23-30 julio 2005. Kaptu la okazon partopreni kiam la tre najbara lando invitas nin. Laŭ La Espero la planoj de programeroj estas jam progresintaj.
Se vi pagas la kongreskotizon en decembro ĝi estos la plej malalta.
(vidu Ponton 5-04 aŭ La Esperon 6-04)

## La jarkongreso de SEF 2005

okazos en Haninge (20 minuta vojaĝodistanco de Stokholmo) la 14-an kaj 15-an de majo.
Aliĝkosto 200 SEK antaŭ la 31-a de marto, poste 300 SEK. SEJU-membroj 100 SEK.
Pagu al postĝiro 82 26 64-9, Esperantoföreningen Södertörn.
Hotelon kaj manĝon oni pagos aparte. Vidu informon pri tio en venonta n-ro de La Espero.
Proponoj por la jarkunsido de SEF devas atingi la estraron antaŭ la fino de februaro (adreso Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

## Utilaj interretaj adresoj

WWW.lernu.net tre taŭga komputila lernilo
De tiu hejmpaĝo oni ĝis nun povas elekti ok diversnivelajn kursojn, gramatikklarigojn, vortarojn, testojn kaj ekzamenojn
www.google.com/intl/eo/. Estas tre utila kaj interesa serĉilo
www.esperanto.se
estas la retpaĝo de Sveda Esperanto-Federacio kun informoj pri esperanto, UEA, kursoj, junulaj paĝoj, Eldona Societo, ktp.
Estas vizitinda paĝo.



Nästa **Ponto**, nr 1
utkommer ca 26/2
Skicka allt material till
*Karin Lindquist*
senast den 12.2

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté/*redakta komitato:*
**Kontaktperson:** *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20
Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Helen Claesson (desegnaĵoj), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado), Gertrud Lund.



ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 75 N-ro 6 (689)* >>Ĉiam antaŭen<< Fondita en 1906




**Konversacia kurso**
Ĉiuj, kiuj volas plibonigi sian Esperanto-paroladon estas bonvenaj al la konversacia kurso, ĝi komenciĝos lunde 17.01 inter 15.00-16.30. Kaptu la okazon en la kurso ekzerci gramatikajn aferojn kaj paroladon antaŭ la jubilea kongreso en 2006.

**Glöm inte att betala din medlemsavgift för 2005 så du kan erhålla medlems-tidningen PONTO**
**La kasistino**

## SEF kaj La Espero

N-ro 6 de La Espero estas vere leginda. Multaj informoj pri kio okazas en Svedio kaj eksterlande, informo pri ”Kiu faras kion en la estraro” kaj pri helpantoj en Esperanto-centro. Aparte interese estas legi ”letero de la estraro” kio donas al ni membroj sciigon pri kio okazas en la sveda movado. Al la redaktoro Leif Nordenstorm grandan laŭdon pro bonega gazeto.

KEM/KL


Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ*
☏ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
*Sten Svenonius sten@agado.net*
☏ 040-19 14 77

# Kontaktilo

*Membrogazeto de K.E.K*
*Konversacia Esperantista Klubo*
*Kopenhago*

N-ro 6 (659) decembro 2004  68-a jaro




## Interreto

Interreta aliro ekzistas en la klubejo ĉiulunde, kaj eblas por la klubo sendi kaj ricevi interretmesaĝojn, ĉar nun ni havas interretadreson: defakek@hotmail.com

## Pri kursoj kaj studgrupoj – jen nia oferto post novjaro:

**Kurso:**
Kurso por komencantoj ĉiulunde 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45 de 3/1 ĝis 7/3.

**Legogrupo kaj studgrupoj:**
Arne Casper estras legogrupon (temo: La fabeloj de H.C.Andersen) ĉiulunde 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45 ĝis 7/3.

La du studgrupoj funkcias preskaŭ ĉiun duan lundon – 3/1, 17/1, 31/1, 7/2 kaj 28/2 -  20.00-20.45 kaj 21.00-21.45.

1: Ni daŭrigas la laboron pri la libro de Kolker: 'Vojaĝo en Esperanto-lando' - voĉlegado, tradukado (se necese), diskutado, lingvaj interesaĵoj


2: Ni daŭrigas ankaŭ la laboron pri H.C.Andersen-fabeloj, kiun ni pasintvintre komencis.
Gvidantoj Bent kaj Lene.

La kondiĉo por partopreni kurson, legogrupon aŭ studgrupon estas membreco de unu el tiuj kluboj: KEK, DEFA Kopenhago, DEJO. Parolu kun la du kasistoj, Karen Olsen (DEFA) kaj Arne Casper (KEK).

**Kutimaj horoj en la klubo:**
Kafo/teo-trinkado 19.30 - 20.00.

Programoj 20.00 – 20.45 + 21.00 – 21.45.

Komuna manĝado la unuan lundon de la monatoj je h. 18.30: Buterpanoj mendeblas ĉe Ruth, tel 3646 6279, aŭ kunportu mem.



**Julmiko, lundon 13/12 je horo 18.00**
Ni manĝos abundan manĝaĵon konsistantan el diversaj varmetaj kaj malvarmaj pan-surmetaĵoj - eĉ por vegetaranoj - kaj la vespero estos plena de ujutno, kantoj kaj ebla paroladeto. Muzike *Kim* gvidos nin.
Ĉio tio kostos po 60 DKK + trinkaĵoj je kutime malaltaj prezoj. Aliĝo necesa en la klubejo aŭ plej malfrue 07.12.04 al Karen, tel 55 72 73 77 (rete eho-esperanto@stofanet.dk)

## Invito al Zamenhof-vespero

La Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo (KEKG) invitas vin al Zamenhof-vespero, sabaton la 11-an de decembro 2004,  je la horo 19.30 ĝis 23.00 en Frederiksberg Medborgerhus, Danasvej 30 B, salono n-ro 1, dua etaĝo.




**Programo:**
La tradicia programo estos tre abunda kun aŭdigo de kompakt-diskoj de interesaj temoj, paroladetoj de Tove Schleicher, Aggi Norstrand kaj Helen Claesson.

Dum paŭzo estos muziko, kantoj, manĝo, trinkaĵo…
Kostoj: po 50 kr. persono.
Bv.aliĝi  kiel eble plej baldaŭ – aŭ plej malfrue sabate, la 5-an de decembro al Torben Svendsen Tel. 38 74 97 64, rete: kulturgrupo@webspeed.dk

## Ĝeneralkunveno de KEK la 14.2 2005 je horo 20.00.

**Tagordo**
a  Elekto de direktanto.
b  Raporto de la prezidanto pri la agado dum 2004
c  La kasisto prezentas la kalkulaĵon por 2004 kaj la budĝeto por 2005.
ĉ  Proponoj (ili estu ĉe la prezidanto 10 tagojn antaŭe).
d  Elekto de prezidanto por 2 jaroj (funkcias nun Jytte Sunekær)
e  Elekto de 2 estraranoj  por 2 jaroj (funkcias nun Jens S. Larsen kaj Bent Wiinberg).
f  Elekto de 2 estraraj anstatŭantoj por 1 jaro (funkcias nun Ana Røssum kaj Ileana Schrøder).
g  Elekto de 1 revizoro por 2 jaroj (funkcias nun Werner Madsen)
ĝ  Elekto de 2 revizoraj anstataŭantoj por 1 jaro (funkcias nun Simon S. Petersen kaj Bodil Kühlmann.
h  Eventualaĵoj



## Klubo Esperantista de Helsingborgo

**Karaj legantoj**!

Mi ĵus finlegis la informriĉan, faktoplenan verkon de Robert Phillipson ”Ĉu nur-angla Eŭropo? Defio al lingva politiko.” tradukita de István Ertl. Phillipson estas esplora profesoro en la Fakultato de Lingvoj, Komunikado kaj Kulturaj Studoj ĉe la Kopenhaga Lernejo pri Komerco.
Li priskribas per multaj ekzemploj kiel lingvoj influas nian identecon, kio estas lingva politiko, kiuj tendencoj influas la eŭropan lingvan politikon kaj kiel lingvoj funkcias en la EU- institucioj.

Li pledas por lingva politiko pli aktiva, protekte al multlingva Eŭropo. Malgraŭ deklaroj kaj rezolucioj, lingva politiko kaj lingvaj rajtoj havas malaltan prioritaton en la agado de EU. Li finas per demando: ”Se daŭros la lingvopolitika senageco je supernacia kaj nacia niveloj, tiam ni eble survojas al Eŭropo sur usona, nur-angla lingva fundamento. Ĉu do tion volas la civitanoj kaj gvidantoj de Eŭropo?”

Se vi interesiĝas pri la politika aŭ sociala flankoj de la temo ’lingvo’, legu la libron. Ĝi ne estas facila sed postulas iom da klopodo kaj cerba laboro. Tamen ĝi instruas kaj pripensigas.

De la kluba horizonto mi havas malmulton por rakonti. Ni ĵus havis nian lastan dimanĉan renkontiĝon por tiu-ĉi jaro. En decembro ni ne aranĝas ion, sed donas al niaj membroj okazon partopreni la aranĝojn de aliaj kluboj. Dum la venonta ”semestro” ni havos klubajn kunvenojn unufoje monate, dimanĉe je la 14-a horo, plejofte en la ejo en Faktorsgatan 5. La datoj estos: 23/1, 20/2, 20/3, 17/4 kaj 22/5. La maja kunveno verŝajne okazos en la ĝardeno de iu el niaj membroj.

La merkreda studgrupo havos paŭzon ĝis la 12-a de januaro, kiam ni daŭrigos nian legadon, ekzercadon kaj diskutadon.

Nome de la estraro kaj la membraro mi volas danki ĉiujn partoprenantojn de la esperanta agado ĉirkaŭ la Sundo. Kvankam mi ofte sentas ke ni devus fari multe pli, mi ĝojas pri la kunlaboro, pro tio ke ni ne estas solaj. Nia klubo estas ege malgranda kaj malforta, sed ĝi ankoraŭ vivas.



Mi esperas ke vi havos agrablajn kaj ĝojajn festotagojn kaj deziras al vi feliĉan, prosperan novan jaron!

Se vi ŝatus festi la novjaron en Esperantujo mi havas kelkajn proponojn: Esperantogården , IF 27/12 – 3/1 en Magdeburg (www.internacia-festivalo.de), IS (Internacia Seminario) de Germana Esperantojunularo en Wetzlar (www.esperanto.de/is/de) aŭ Novjara Renkontiĝo 27/12 – 3/1 en kastelo Marienburg ĉe Zell/Mosel (www.esperantoland.org), la tri lastaj en Germanio.

Amike via, Ann-Louise

## La Esperanto klubo de Lund

**Al ĉiuj legantoj de Ponto kaj aparte al la anoj de LEK KORAJN BONDEZIROJN okaze de KRISTFESTO kaj por 2005!**



Bonvenon al nia antaŭkristnaska renkontiĝo, dimanĉe 5/12, je la 13-a h, ĉe SENSUS. Ni komencos per jula bufedo. Sekvos laŭtradicia programaro: lotumado, aŭkcio, vendado de libroj, julkartoj, aliaĵoj. Ni petas vin kontribui! Kompreneble estos ankaŭ kafumado
Aliĝo tel. 046-14 73 09.

Kiel vi povis legi en Ponto 5, la venonta SEA-kunveno okazos en Lund, 12/3 2005. Jam notu la daton!

Nia novembra kunveno ne sekvis la anoncitan programon pro neveno de la preleganto. Anstataŭe Kristina Takman prezentis Vermlandon, en interesa kaj amuza maniero, i.a. per kvizo rilate al famaj vermlandaj kantistoj, orkestroj, verkistoj, sed ankaŭ sportaj teamoj. Ŝi krome parolis al ni en alia lingvo, nome la vermlanda, legante poemon de G. Fröding.

Ni poste transiris al Olof Palme. La en Ponto 5 menciita sumigo de Harry Engkvist pri la vivo de Palme jam troviĝis en e-traduko. Ni laŭtlegis elektitajn tekstojn, kaj en la sveda kaj esperante. Aparte temis pri vizito de Palme en Tanzanio kaj lia amikeco kun Julius Nyerere.
Estis decidite kolekti similan materialon pri aliaj homoj, tamen ne nur svedoj, sed ankaŭ afrikanoj iel ligitaj al Svedio.
Ulla Saether trifoje renkontiĝis kun la nuna prezidanto de Kenjo, ŝi do estas la kontribuonto al la dua ĉapitro de nia kompilaĵo.

La unua renkontiĝo 2005: 13/1 – vidu la kalendaron!

Raportis
Anna-Maria Lange

| | | |
|---|---|---|
| Dimanĉe 05.12 | LEK, Lund | Antaŭkristnaska renkontiĝo |
| Lunde 06.12 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Sabate 11.12 | KEKG, Kopenhago | ”L.L. Zamenhof - Festvespero” |
| Lunde 13.12 | KEK/DEFA, Kph | Je horo 18.00: La tradicia JULMIKO - informo en Kontaktilo |
| Lunde 03.01 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Lunde 10.01 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj. |
| Jaŭde 13.01 | LEK, Lund | Kvin minutojn pri pasintaj festotagoj - ĉiuj kontribuu |
| Lunde 17.01 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Marde 18.01 | KEKG, Kopenhago | ”1954-10.12. 2004: La 50-jara datreveno de la Montevidea Rezolucio favore al Esperanto”. Mogens Andersens rakontos |
| Dimanĉe 23.01 | KEH, Helsingborg | La studrondo kunvenos |
| Lunde 24.01 | KEK/DEFA, Kph | Kurso. |
| Merkrede 26.01 | KEM, Malmö | Karavanvojaĝo al naciaj naturprotektejoj de Sudafriko, Per-Olov Johansson rakontos kaj montros bildojn |
| Lunde 31.01 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Merkrede 02.02 | KEKG, Kopenhago | ”La sveda verkisto Astrid Lindgren kaj siaj verkoj” Kerstin Rohdin rakontos pri Astrid Lindgren |
| Lunde 07.02 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Merkrede 09.02 | KEM, Malmö | Viva gazeto. Ĉiuj povas kontribui |
| Jaŭde 10.02 | LEK, Lund | Prezento de novaj eminentuloj - svedaj kaj afrikaj |
| Lunde 14.02 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj.<br>Ĝeneralkunveno de KEK- tagordo en Kontaktilo |
| Dimanĉe 20.02 | KEH, Helsingborg | Je 14-a h. La studrondo kunvenos |
| Lunde 21.02 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj<br>Membrokunveno de DEFA, Kopenhago, |
| Merkrede 23.02 | KEM, Malmö | Libro-aŭkcio - bokauktion<br>Många fynd på esperanto och svenska |
| Lunde 28.02 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Lunde 07.03 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj<br>Kantvespero |
| Merkrede 09.03 | KEM, Malmö | Jarkunsido. Tagordo en Ponto n-ro 1-05 |

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

### Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.
La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

### La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.
Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h. en la ejo de nia studorganizo SENSUS, Krafts torg 12 A.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange, Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aŭ rete: Allan Ljungstedt, allan.ljungstedt@telia.com

### Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.
La kunvenoj okazos je la 14-a horo en Faktorsgatan 5.
Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe Barbro Haraldsson tel. 042-121471

### Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.
Kunvenas en la ejo de DEFA. Vidu la informojn tie. Prezidanto: Jytte.Sunekaer@mail.tele.dk
tel. 0045-44 48 47 26

### Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG
Aranĝoj en Medborgerhuset, Danasvej 30 B, atingebla per buslinio 29 el stacio Vesterport, salono n-ro 1, dua etaĝo.
Pordoj malfermitaj 19.00-23.00. Ĉiu prelego okazos ĉ. 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al Torben Svendsen, Vanløse Alle 57, DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
rete: tsvendsen@webspeed.dk

### Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA
Kunvenas lundojn inter 19.30-22.00 en Banedanmark, entreprise, Vasbygade 10.
Por eniri: uzu la sonorilon ĉe la (krad)pordo.
Kontaktulo: Lene Niemann,
tel. 0045-49 26 13 19
Rete: niemann@mail.dk
Kluba retadreso: defakek@hotmail.com

## *Hejmpaĝo de SEA www.agado.net*

## Esperanto - ett språk för gymnasiet

Seminarium för språklärare utan kunskaper i esperanto (gymnasier, folkhögskolor, studieförbund, högskolor)

Tid: tisdag-onsdag 8-9 februari 2005
Plats: Karlskoga folkhögskola
Innehåll: ex. historik, utveckling, propedeutik, grammatik, litteratur, Internet…
Mål: Att ge en bred information om esperanto för dem som inte kommit i kontakt med språket och vid önskemål bygga upp en varvad lärareutbildning

Ytterligare information och anmälningsblankett:
Kortkursexpeditionen
Karlskoga folkhögskola, S-691 24 Karlskoga
Tel. 0586-646 00 E-post
anders.thunberg@folkbildning.net
Kursledaren Lars Forsman nås på 0586-548 11

**Avgifterna UEA för år 2005 är följande:**

| Kategori | | |
|---|---|---|
| MA | Direktmedlem med årsbok och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får Kontakto. Ange födelseår! | 500 kr |
| MJ | Direktmedlem med årsbok. I övrigt se ovan ! | 200 kr |
| MG | Direktmedlem med ”Gvidlibro”. Ger inte nersatt kongressavgift | 80 kr |
| SZ | Avgift för ”Societo Zamenhof”, särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA | 1.000 kr |
| PT | ”Patrono de TEJO”, får tidningen Kontakto | 600 kr |
| DM | ”Dumviva membro” betalar för hela livet. Får tidn. Esperanto och årsbok | 12.500 kr |
| DMJ | ”Dumviva membro kun jarlibro” betalar för hela livet. Får årsboken | 5.000 kr |